



Informoj:  
Arto :- Literaturo  
Turismo :- Sciigoj

# NIA VIVO

Administracio  
kaj Redakelo:  
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

## PLEGARIA ANTE LA VERDE BANDERA

A Ti, gran misterio incorpóreo, que el mundo  
Como ingente potencia dominas,  
A Ti del amor y verdad fuente excelsa,  
Manantial de que fluye la vida,  
A Ti, siempre el mismo en el fondo del alma  
Aunque te presenten en forma distinta,  
A Ti te rezamos, Creador supremo,  
En este gran día.

A Ti no venimos con credos de patrias,  
Ni dogmas de ciega porfía;  
Cesó el disputar de creencias dispares  
Y el credo cordial nos inspira;  
Con él, que es igual para todos los hombres,  
Con él, verdad suma que amor y paz brinda,  
Hoy todos los hombres en tu altar excelso  
Piadosos se inclinan.

El género humano, que hiciste tan bello,  
Divide la lucha continua;  
Un pueblo a otro pueblo feroz acomete  
Y un hombre, chacal, a su hermano asesina.  
Quienquiera que seas. Poder misterioso,  
Escucha la voz que sincera suplica:  
Devuelve a los hijos del género humano  
La calma perdida.

Juramos luchar por la unión de los hombres,  
Luchar con el alma y la vida,  
Sostennos ¡oh Fuerza! tu impulso nos lleve  
Al triunfo final sin caídas.  
A nuestros afanes otorga tu gracia,  
A nuestro fervor nuevas fuerzas inspira  
Y así los ataques salvajes el alma  
Por siempre resista.

Llevemos muy alto el glorioso estandarte  
Del bien y belleza la insignia,  
La fuerza del mundo estará a nuestro lado  
Y hará la victoria magnífica.  
Los muros que pueblos y pueblos separan  
Caerán con estruendo, y ante sus ruinas  
De amor y verdad surgirá el nuevo reino  
Que el hombre quería.

Traducción libre al español de  
VICENTE INGLADA.

La ĝenerala jara kunsido okazos la 29.<sup>a</sup> de la  
nuna monato, je la 11.<sup>a</sup> matene, ĉe la socia ejo  
de Sindicato de Iniciativa, Placo Sas, 3. Oni pe-  
tas, ke ĉiuj fratecanoj ĉeestu tiun kunsidon.

## NE BATU GEINFANOJN!

Patro, patrino, vi kiuj tiel amegas viaj gefilojn  
ne batu ilin kvankam ili estu terure malbonaj.  
Estas multaj gepatroj, kiuj kredas, ke se oni  
batpunas geinfanojn ili estas pli obeemaj kaj eĉ  
pli saĝaj. Tio, laŭ mia opinio estas la plej terura  
sensencaĵo. Oni devas komenci la moraledukadon  
de la geinfanoj kiam en la lulilo ili ekploras.

Oni ofte lernigas geinfanetojn por ke ili batu,  
por ke ili insultu kaj por ke ili faru malbelajn kaj  
malbonajn aĵojn kiuj al ni ŝajnas tre graciaj, kaj  
eĉ ni diras kiam iu bela bubeto batas aŭ insultas  
nin: «Kiel lerta li estas!»

Poste li kredas, kaj ĉar al la infano oni instruis  
pri malbonaĵoj por nin amuzigi, la infano pligran-  
digas ilin.

Tiam, la patro volas lin puni, la patrino defen-  
das la fileton, kelkfoje eĉ ricevante la batojn al  
la filo direktitajn.

Malfeliĉulino!

Kial vi, gepatroj, ne instruis vian filon por ke  
ili komprenu la amon anstataŭ por ke ili vin  
suferigu?

Vi, patrino, pro via blinda amo plej ofte estas  
kulpa, ke viaj filoj estas malbonaj. Ĉiuj patrinoj kaj  
precipe la hispanaj kutimas esti pardonemaj, esti  
pardonema estas ja belega afero sed, ĉu ne estus  
multe pli bela ne bezoni pardonon ĉar la moraledu-  
kado, kiun al la gefiloj oni instrui estis tre bona?

Pri tiu ĉi arto oni devus instrui ĉiujn gepatrojn  
kaj precipe patrinojn.

Kelkfoje, kvankam la patrino ne permesas, ke  
ŝia edzo batu la gefilojn, ankaŭ ŝi ilin batas kole-  
riĝinta. Pro la bato geinfanoj treege koleriĝas kaj  
tre ofte anstataŭ obei pligrandigas tiun malbo-  
naron kiun antaŭe ili faris.

Tiu afero, kiu rilatas la edukadon de la gefiloj  
malfeliĉigas multajn familiojn kaj multege mal-  
bonigas la homaron.

Gepatroj! Komencu edukante vian filon de kiam  
li naskiĝas, neniam pri tio ĉi la infano estas tro  
juna. Poste neniam li batu sed admonu kaj kon-  
silu ĉiam lin per amaj vortoj.

PILAR SALVO GONZÁLEZ.




**MALKARA VOJAGO** (\*)
 

 el José M.<sup>a</sup> Selgas

Madrido estas mortinta.

Somero, kiu vivigas kamparon, mortigas urbon.

Kiam la birdoj konstruas siajn nestojn, kaj la arboj kovriĝas per fruktoj kaj la ebenajoj per grenkeskajoj kaj la montoj per verdajoj, tiam, la urbo, tiu dua Naturo el ŝtono, briko kaj kalko, kiun civiliza homo konstruis, haltigas sian malkvietecon, atendante la vintrajn malvarmojn kaj malhelojn por reakiri la tutan varmon de sia brila klopodega vivo.

Ŝajnas ke la grandaj homvivaj centroj seniĝas de siaj ĉarmaĵoj, kiam Naturo sin ornamas per la siaj.

Same kiel en Madrido ne estas duonkleraj personoj, kiuj ne faras tagon el nokto, tiel tiuj urbejoj, tiuj homaraj abelujoj faras sian vivan someron el natura vintro.

Rigardu Madridon.

Simile al laca vojiranto meze de la vojo, ĝi sidas sur vasta senfrukta ebenajo.

Por spiri ĝi malfermas siajn ampleksajn stratojn kaj ĝi polvenglutas.

Ĝi estas kliniĝinta sur la bordon de rivero, kiu, soifpremite, apenaŭ penfluas; kaj vane ĝi pretendas sin kaŝi de la ĉiela rigardado sub kelke da arboj, kiuj ne ombrigas ĝin.

Oni vidas ĝin malgaja, sveninta, kiel kandela lumo surprizita de la matenhelo.

Noktevidata de la «Pia Princo»-a montpinto, ĝi ŝajnas tombejo. Des pli ĉe la palaj lunreflektoj.

De ĉi tiu loko, rigardante helpe de la fantazia reto de lumoj, kiuj agitmoviĝas en ĝia ejo, kiel tiuj misteraj fajretoj spruĉantaj el tomboj, oni povas legi strangajn tomskribaĵojn.

Jen vidu iujn.

Sed ne; ni respektu la misterajn sekretojn de la putrado. Almenaŭ ni havu la dececon pri niaj mizeroj.

Ni haltigu ĉi tiun funebran ekskurson, ĉar ni ne rajtas eniĝi en la privatan vivon de la mortintoj.

Ni forlasu Madridon.

Por ĝin forlasi mi ne havas alian vojon ol tiu, kiun mia plumo malfermos sur la papero. Sed ĝi sufiĉas.

Mi estas flugonte tra mia plaĉa dezirkampo.

Tio estas vojaĝo por kiu mi ne bezonas veturilan sidlokon, nek pakajon, nek pasporton.

Malkara vojaĝo, kiun ĉiuj malriĉuloj povas fari kun mi.

Ĝi estas somera ekskurso nepostulanta monon por ĝin fari.

Ne estas avarulo, kiu legante ĉi tiujn liniojn, ne malfermu tiom la orelojn, kiom li malfermas la manojn ricevante la procentegon, kiu estas la avarrikolto.

Mi mem miras, ektuŝegante la ideon povi fari unu paŝon ĉe homoj sen elspezo de mono.

Antaŭ ol ekmarŝi, estas necese solvi gravan aferon; ni bezonas scii kien ni iras.

Hazarde, kaj sendube pro ekstravaganco la tero estas plena je dezertaj lokoj kaj la maro nin ĉirkaŭas kvazaŭ ĝi volus nin aresti.

Tiu ĉi kvazaŭmalsenco alportas aliun; ni povas fari liberan elekton.

Tio estas, ni povas pli, ol la registaro.

Nur estas bezone peti; Naturo pagas.

Do, mi petas montan bazon kovritan de herbetbedo, ombrigitan de pomarboj kaj sovaĝarbustoj.

Mi volas, ke ĝi estu gracie tranĉita de valo plejplena de kaŝtanoj inter kiuj estus saltfalanta rivereto, freŝa kiel infana vizaĝo kaj pura kiel cigna plumo.

Mi kredas ke mia edzino ne ofendiĝos pro mia kuŝapogo al tiu gracia montjupo.

Mi bezonas monteton starantan post mi, pli malebena ol tridekjara fraŭlino kaj pli kaprica ol 15-jara knabino.

Mi bezonegas profundegaĵon, kie ŝaŭmege mal-suprensaltas, simile al frenezesenbrida ĉevalo, impeta torento, super kiu nepre elstaras nuda roko, senhara kiel kapo de maljunulo leganta en tiu libro la pasiajn impetojn kaj la rapidecon de la vivo.

Tiu ĉi pejzaĝo necese subiĝos ondmitde ĝis sinkaŝo sub la marondojn.

Maro! Belega bildo kies kadro estas horizonto.

Fiera elemento senripoze frapeganta la randajn rokojn kaj tute lekanta la marbordan sablaron.

Jam ni estas ĉe la marbordo; la ondegoj grimpas kaj leviĝas kaj amasiĝas kaj vice faldiĝas ekkisante niajn piedojn.

Vidante sin surprizita per tiu ĉi subita saluto oni nepre iom malantaŭenpaŝas ekkriante: Nu!

Jen la loko elektita de ni por pasigi la someron.

Mi ne petis florojn, nek birdojn, ĉar tie, kie estas akvo kaj aero, ne mankas floroj, nek forflugas birdoj.

Mi ne petis ĉielon, ĉar ĝi estas ĉie.

Sed antaŭ ĉio mi bezonas havi ĉi tie mian ge-duonon, ĉar sen tiu mem-mia duono, mi sentus nur duone la ridetan perspektivon de ĉi tiu solula pejzaĝo.

Ĉiu venonto alportu siajn gefilojn kaj li ĉion

(\*) La tradukinto de tiu ĉi bela artikolo estas lermanto de la kurso de Esperanto, kiun S-ro Inglada faras en la Centro por prihistoriaj studaĵoj. Estas mirinda pruvo pri la simpleco de Esperanto, ke nur post du monata lernado oni povas senerare traduki tiaj literaturajn tekstojn.



vidos multokule kaj ĉion li sentos multoble kvazaŭ li estus multanima kaj multekora.

Estas neeble forlasi Madridon per malpli da ĝenoj kaj elspezoj.

Imago estas rimedo ĉiam preta plenumi niajn dezirojn.

Homo havas en si kontentigan amikon ĉion al li liverantan.

Iluzio estas realaĵo por senmonuloj.

Ĝi estas la luksego de la malriĉuloj kaj la dezira fervojo.

Alian pardonon por eliri Madridon mi ne trovis, kaj mi lasas ĝin malfermita por tiuj, kiuj volos imiti mian konduton.

Kiom da homoj nun vojaĝas kiel mi!

El hispana lingvo tradukis,  
RICARDO MORENO.

## LA ESTONTECO ESTOS NIA

Nenia problemo estas tiel interesa en la mondo, kiel la disvastigo de la internacia helpa lingvo Esperanto.

Sed, la eksterordinara naciismo de kelkaj registaroj, kiuj altrudas la aliajn, malhelpas la klopodojn de la esperantistaro por divastigi tiun lingvon.

Tamen, kiam la tuta homaro komprenos la grandan influon kaj utilecon de tiu grava eltrovo, Esperanto venkos, la milito malaperos kaj la homa progreso rapidiros pli ol neniam.

Do, estas nepre necese ke la individuoj de la homa familio, tiel la esperantistoj kiel ne esperantistoj, estos konvinkitaj je tio.

De tiam, nia helpa lingvo progresos, de tiam nia laboro kreskos kaj iom post iom ni konkeros la tutan mondon.

Samideanoj, leviĝu viajn korojn.  
La estontece estos nia.

ANDRÉS PIÑÓ.

Valencia 1-XII-930.

## HEZITO

INTERAKTA AMUZAĴO DE JOSEFO ORÓS

Kore dediĉita al la klera esperantisto Sro Vicente Inglada.

PERSONOJ:

S-ino Karmen..... 50 aĝa, patrino de  
F-ino Julia..... 20 aĝa  
F-o Ludoviko..... 22 aĝa

(La scenejo prezentas ĝardeneton de somerdomo, kiu staras maldeskrete; kadro ĉe la fundo kun uzebla pordo).

## SCENO I

(S-ino Karmen kaj F-ino Julia sidantaj. Inter ili tableto. La unua kroĉtrikadas; la dua legas libron).

*Karmen.* Ŝajnas, ke Ludoviko malfruiĝas hodiaŭ.

*Julia.* (Kun malsata tono). Ĉs... por kio li taŭgas...

*Karmen.* Ĉu hodiaŭ vi ankaŭ malpacetas?

*Julia.* Ne, li ja neniam koleras, li ja donas al mi neniam mctivojn por intermalpaco. Li ĉiam venas akurate, ĉiam konsentas pri miaj kapricoj, kiuj, intence, estas strangaj nur en la celo ke li ekkoleru kaj donu al mi motivojn por elpeli lin. Sed tion mi ne povas trafi. Ĉiam li estas obzema, neniam li ĉesas esti afabla (malplaĉe). Ho! mi ne povas plu suferi lin! Mi ne amas lin! Nu, patrino, mi ne amas lin!

*Karmen.* Bone, filino mia, bone. Ne koleriĝu, li ne malfruos alveni.

*Julia.* (Nu, ree). Ĉu mi ne diris al vi, ke mi deziregas ke li ne venu, kaj tiel finj por ĉiam niajn rilatojn? Ĉu mi ne diras al vi ke mi ne amas lin?

*Karmen.* Sed ne estu petola infanino. Ĉu li ne estas bona viro? Ĉu li ne havas bonan estontecon? Mi opinias, ke por nia klaso li ne estas malbona propono kiel edzo. Mi ne kredas, ke vi sopiras pri ia hinda reĝido.

*Julia.* (Senpacience). Sufiĉe, patrino. Mi ja scias ke li estas bonega viro, eble pli bona ol mi meritas, sed mi ne amas lin.

*Karmen.* Bone, tio alvenos poste. Vi de nelonge interrilatiĝas.

*Julia.* Ne diru, ke nelonge. Jam sufiĉe por ke mi povu konvinkiĝi, ke li ne estas al mi simpatia.

*Karmen.* Atentu ke la viroj edziĝas kiam ili volas kaj la virinoj kiam ili povas, kaj mi pensas ke vi ne volos restadi fraŭlino dum tutvivo.

*Julia.* Mi tion preferus pli ol edziniĝi kun li.

*Karmen.* Ludoviko amegas vin.

*Julia.* Mi tion scias; kaj nur tiu konsidero malhelpis, ke mi regalu lin per bela amrifuzo; sed mi estas tute certa ke mi estos nefeliĉa kun li, kaj deziregas la plej sensignifan motivon por rompi niajn amrilatojn.

*Karmen.* Pripensu tion kion vi faros, Julia. Mi kredas ke vi agos malsaĝe se vi plenumas vian intencon.

*Julia.* (Malplaĉe). Ne insistu pli, panjo. Pro



vi, mi akceptis lin. Pro via ambicio, kiun mi trovas plene pravigita, mi elportadas lin depost kvar monatoj; sed mi kredas ke vi ne volos oferi vian filinon edzinligante sin por ĉiam kun viro kiun ŝi ne amas, por malfeliĉigi min la tutan vivon.

*Karmen.* Vi estus pli malfeliĉa se estus li, kiu ne amus vin.

*Julia.* Do, laŭ via opinio, mi devas iri ĝis la fino, ĉu ne?

*Karmen.* Ne, filino mia, ne. Faru tion kion vi volos. Vi ja scias ke ĉe koraj aferoj mi ne altrudos mian volon. Fariĝu via deziro!

(Daŭrigota).

— S O R Ĉ A V I V O —

Mi volus esti la papavo mola, kiun milda ventet' lude balancas, kaj kiu meze de la kampoj dancas inter verdaj tritikoj bela, sola:

satiĝante de lum' en majvetero, mi lume brilus kiel fajrpokalo; de la tigo velkinta venus falo ĉe l' unuaj mallumoj de vespero, kaj post disfal' de ĉiuj florpetaloj, du solaj rememoroj pri mi estus: sur la tero kuŝantaj, semoj restus; en l' ser', min kantante, najtingaloj.

RAMÓN D. PERÉS.

Trad. el la hispana:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

MALNOVAJ PAGOJ

ESPERANTISTAJ SENTENCOJ

Ne tiu estas bona esperantisto, kiu bone esperas, sed tiu, kiu ebligas bonan esperon.

\*\*\*

Se vi skribas malbone en via propra lingvo, havu la bonecon skribi nur en ĝi, ĉar en Esperanto oni skribas sufiĉe malbone sen via helpo.

\*\*\*

Nur talento, komprenado, imago, fantazio, klareco kaj bongusto—kaj vi ĉion tre bone kaj bele esprimos en Esperanto. Oni bezonas nenion pli...

\*\*\*

Internacieco ne estas neigo de nacieco: internacieco ne pretendas forigi la malbonajn ecojn de la nacioj; ĝi volas nur transdoni la bonajn ecojn de unu nacio al la aliaj.

\*\*\*

Kunigu la animetojn de la naciaj lingvoj—vi havos la animon de l'lingvo internacia.

\*\*\*

Krei lingvon, en kiu oni povas esprimi nenian malsaĝon, kaj devigi ĉiun kontraŭulon de lingvo internacia paroli en tiu ĉi lingvo—jen, saĝne, estas la sola rimedo fari amikon de lingvo internacia el ĉiu ĝia malamiko. Se vi ne konsentas, serĉu alian rimedon...

Eltirita el «Lingvo Internacia» n-ro 4<sup>a</sup>, aprilo 1896<sup>a</sup>.

— S C I I Ĝ O J —

Ni sciigas al la fratecanoj, kiuj ludlotis en la n-ro 6.174 de la Kristnaska Loterio, ke ĝi estis premiita.

Kiuj loĝas en Zaragoza povos ricevi la respondan monon ĉe Frateco aŭ ĉe Presejo Larruga, Convertidos, 9. Kiuj loĝas ekster Zaragozo povos ĝin ricevi sendante la biletojn al Frateco por sendi al ili la monon per poŝta ĝiro.

\*\*\*

La 26.<sup>a</sup> decembro aro da antuziasmaj esperantistoj de Valencio vizitis Cheste kaj Chiva, kie sroj Piñó kaj Mayral faris paroladon.

\*\*\*

La Valencia Urba Konsilantaro subvenciis la Valencian Esperantistan Grupon per 2.000 ptj.

\*\*\*

Fomento de Turismo de Valencio, publikigis sub la gvidado de Valencia Esperanta Grupo, belan kaj artan Gvidilo en Esperanto.

\*\*\*

En Madrido la esperantistaro festis, la 18.<sup>an</sup> decembro, la datrevenon de la naskiĝo de Dro Zamenhof ĉe la Ateneo. Fino Lucrecia San Antonio legis belan paroladon pri la signifo de nia entrepreno kaj helpo, kiun povas doni al ĝi la fervoraj virinoj; Sro Inglada faris paroladon pri «Esperanto kiel ilo de paco kaj tutmonda interfratiĝo» en kiu raportis pri la sentimenta vivo de Dro Zamenhof, sin helpante per la teksto de liaj versaĵoj «La Espero», «La Vojo», «Mia Penso», «Ho! mia kor'», kaj «Preĝo sub la verda standardo», kies hispanaj tradukoj estis verse faritaj de la parolanto kaj kelkaj el ili jam estis publikigitaj de NIA Vivo; fine S-ro Mangada faris paroladon pri la flanko romantika de Esperanto.

— S P R I T A J O J —

Oni demandis al sinjorino, kiu piediris tra la strato kune kun siaj filoj:

—Kiom da jaroj havas tiuj ĉi infanoj?

—Ses jaroj. Ili estas dunaskitoj.

—Kie ili naskiĝis?

—Unu ĉe Madrido kaj la alia ĉe Cádiz.